

itala esperanta revuo

XIII^a JARO

OKTOBRO 1926^a

N. 10

MANTOVA

TURISMAJ INFORMOJ

Hoteloj kaj Restoracioj:

Hotel Aquila d' Oro, Ĉefstrato *Umberto I*, unuaranga.

Albergo Roma, Strato *Mazzini*, unuaranga.

• *Senoner*, Strato *Cesare Battisti*, unuaranga.

• *Italia*, Ĉefstrato *Vittorio Emanuele*, unuaranga.

• *Stazione*, Stacidoma Placo, unuaranga.

• *Virgilio*, Stacidoma Placo, duaranga.

• *Truzzi*, Stacidoma Placo, duaranga.

• *Ferrata*, Strato *G. Oberdan*, duaranga.

• *Tre Garibaldini*, Strateto *S. Longino*, duaranga.

• *Borsa*, Strateto *Cappello*, duaranga.

• *Fontana*, Strato *Solferino*, simpla.

• *Scudo di Francia*, Strateto *Leon d'Oro*, simpla.

• *Arsenale*, Strato *Solferino*, simpla.

Restoracioj:

Ristorante Vesuvio, Strato *Giuseppe Verdi*.

• *Savoja*, „ „ „

• *Tre Garofani*, Strato *Ippolito Nievo*.

• *Bologna*, Stacidoma Placo.

Urbaj Elektrotramoj

De Stacidomo ĝis la urba elirejo *Virgilio* (*Stazione-Barriera Virgilio*), tra Placo *Purgo*, kaj de tiu placo alia al urbopordo *Molina* (*Porta Pusterla-Porta Molina*) kaj alia al ur-

bopordo *Pusterla* (*Porta Molina-Porta Pusterla*); ĉiukurado Lirojn 0.35 (festotagojn L. 0.55).

Eksterurbaj Elektrotramoj:

De la ĉefstrato *Vittorio Emanuele* apud *Teatro Sociale*: foriroj ĉiukvaronhore alternaj al *Dosso del Corso* (km. 5) kaj al *Angeli* (km. 5); por ĉiu kurado L. 0.60.

Interprovincaj vaportramoj:

Al *Brescia* (km. 72) kaj al *Ostiglia* (km. 37), stacidomo ekster urbopordo *Pusterla*. Al *Viadana* (km. 42) kaj al *Asola* (km. 36), stacidomo apud urbopordo *Belfiore*.

Publikaj Aŭtomobiloj:

Stacioj en ĉefstrato *Vittorio Emanuele*, en strato *Goito* (apud placo *Purgo*), en placo *Garibaldi*; tarifo: de L. 1.50 ĝis 2 porkm.; simpla kurado en la urbo L. 8.

Publikaj Motocikloveturiloj:

Stacio en ĉefstrato *Umberto I*, apud *Teatro Sociale*; tarifo: Liroj 1 por km.; simpla kurado en la urbo L. 4.

Publikaj Ĉevalveturiloj:

Stacio en placo *Teofilo Folengo*, apud *Teatro Sociale*; simpla korso en la urbo L. 3.

Poŝt-Telegraf-Telefonejo:

en placo *Garibaldi*.

Urbodomo:

en strato *Magistrato*, N. 19.

Prefektejo:

en strato *Principe Amedeo*, N. 14.

Policejo:

en placo *Sordello*.

Komerca-Industria Ĉambro:

(ŝanĝota en *Ekonomia Provinca Konsilejo*) —
en strato *Pietro Fortunato Calvi*, N. 10.

Esperantista Grupo:

en strato *XX Settembre*, 16; propra sidejo.
Kunveno ĉiumarde je 20-22^a horo.

U.E.A.-Delegito:

S-ro Fernando Zacchè, *Via Salita*, 13.

Bankoj kaj Ŝparkasoj:

Banca d' Italia, strato *Goito*.

- *Mutua Popolare*, ĉefstrato *Vittorio Emanuele*, N. 10.
- *Agricola Mantovana*, ĉefstrato *Vittorio Emanuele*, N. 3.
- *Agricola Italiana*, ĉefstrato *Umberto I.*
- *Commerciale Italiana*, strato *Cesare Battisti*.
- *Nazionale di Credito*, strato *G. Arrivabene*, N. 6.

Unione Bancaria Italiana, strato *Goito*.

Credito Padano, placo *Garibaldi*.

- *Commerciale*, portikoj de ĉefstrato *Umberto I.*

Cassa di Risparmio delle Provincie Lombarde,
strato *Cavour*, N. 50.

Cassa di Risparmio della Città di Verona,
ĉefstrato *Vittorio Emanuele*, N. 8.

Publikaj Necesejoj:

en strato *Goito* (de placo *Purgo*).

Urbaj Vidindaĵoj:

Gonzaga Reĝejo (Duca Palaco kaj Kastelo) — interesege; enhavas la Muzeojn: Egiptan, de antikva statuarto Numismatikan, Urban. — Vizithoroj: dimanĉe de 9 ĝis 12 horo, senpage; nedimanĉe de 9 ĝis 16 horo, enirpago L. 3. — (mondonaco al la gvido: 1-2 lirojn).

Te-Palaco, interesege, vizitebla senpage: de Novembro ĝis Februaro de la 10 ĝis la 16 horo, de Marto ĝis Oktobro de la 9 ĝis la 17 horo; festotage nur ĝis la 12 horo (mondonaco al la gvido: 1-2 librojn).

Baziliko de S. Andrea — tre interesa — kaj la *Duomo* (Katedralo).

Eksterurbaj Vidindaĵoj:

Sanktejo *S. Maria delle Grazie*, ĉe vilaĝo *Grazie* (tramo al *Asola*, km. 7).

Memorajejo kaj Ostejo de la batalo inter Francoj kaj Aŭstrianoj en 1859 ĉe *Solferino* (tramo al *Brescia*, km. 35).



Statuo de la monumento al Virgilio

VIRGILIO

La plej granda inter la poetoj latinaj verŝajne naskiĝis en vilaĝo *Andes* (hodiaŭ *Piètole*) ĉe Mantovo, en la jaro 70 antaŭ Kristo. Lia patro estis sufiĉe bienhava, tial Virgilio povis sin dediĉi al la studoj en Kremono kaj en Milano.

Kiam inter la veteranaj soldatoj estis dividitaj la kamparoj, Virgilio estis senigita je sia patra kamparo; eble en tiu okazo li vojaĝis unue al Romo. Per amikoj, precipe per Mecenato, li povis rehavi sian patran heredaĵon de

Oktaviano. De tiam li kutime vivadis en Romo.

Tie Virgilio amikiĝis kun la plej kleraj viroj, Horaco, Varjo, Gallo, Aŭgusto k. c. Ĉe la fino de sia vivo li vizitis Grekujon; renkontinte Imperiestron Aŭguston li estis kun li revenanta al Romo, kiam ekmalsaniĝinte li alvenis al *Brindisi*, kie li mortis iom pli ol kvindekjara en la jaro 19 antaŭ Kristo.

Laŭ lia deziro oni lin alveturis al

Nàpoli, kie li estas honore enterigita ĉe la dua mejla ŝtono.

Dante, la princo de l'italaj poetoj, simbolis en *Virgilio* la homan saĝecon, kaj tute prave li nomis lin sia kondukanto, sinjoro, majstro, kiam li ekpaŝis al la infera mondo.

Malmulte da skribintoj paroladis tiel ŝpareme pri si mem en siaj verkoj, kiel *Virgilio*; sed tre malmultaj ankaŭ kapablis pentri sin mem de la unua ĝis la lasta verso, kiel *Virgilio*.

En *Bukoliko* facile vi trovas lian junecon kun rememoro de liaj naivaj ĝojoj kaj suferitaj malfeliĉaĵoj; en *Georgiko* vi admiras pli maturan aĝon kaj studemon al la praktika utileco; en *Eneido* vi rekonas plenan viron, kiu larĝiginte siajn ideojn pri la historio de la homaro, ne kontentiĝas preparoli mallarĝan vivkondiĉon kiel en *Eglogoj* de *Bukoliko* kaj en *Georgiko*, sed komprenante ĉiujn viv-

morojn en grandega bildo, instruas la plej grandan el nacioj pri ĝia deveno, antaŭtenirado kaj altaj destinoj, al kiuj la diaĵoj ĝin estonte preparas.

La plej perfekta poemo de *Virgilio* estas *Georgiko* dividita en kvar librojn, kiuj pritraktas arb-best-abel-kulturon. La verso uzita de *Virgilio* estas la heksametro, kiun li ellaboras tiel, ke ĝia sonoro senĉese disvastiĝas tra la tuta mondo.

Ĉio estas dirita, se oni scias ke *Dante* asertas ke li elkaptis el *Virgilio* « la belan stilon, kiu lin honoris ».

Virgilio havis grandan staturon, larĝajn ŝultrojn, oliveman koloron, neĝentilan vizaĝon; li vivadis poete senzorgante siajn vestojn, nek vidigante tute la ĝentilajn manierojn, kiujn li supozigus en siaj versoj. Malmultaj ĝuis kiel li la komunan estimon, ne nur pro lia genio, sed ankaŭ kaj ĉefe pro liaj virtoj.



Vidaĵo de Mantovo

LEGENDO

La origino de Mantovo perdiĝas en la nokto de la antikvaj tempoj kaj estas envolvita de la mito. Legendo diras ke la divenistino Manto, filino de Tirezio, forlasinte Tebon por liberigi sin de la tiraneco de Kreonto, ŝipveturis Italian kaj alteriĝis ĉe *Ravenna*. Migris ŝi kun sia sekvantaro tra Italujo ĝis ŝi alvenis kaj haltis sur insulo de la rivero Minĉo; tie ŝi izoligis de aliaj

gentaroj, tie ŝi vivadis kaj mortis. Ŝia gento restis en tiu loko facile defendebla dank' al la rivero, kiu ĉirkaŭis ĝin, kaj konstruis tie urbon, kiun ĝi nomis *Mantua* (*Mantova*) por honori tiun, kiu unua elektis tiun lokon.

Pri tio aludas *Dante* en sia « Dia Komedio » (*Inferno*, ĉapitro XX):

...e per colei, che il luogo prima elesse
Mantova l'appellar senz'altra sorte.

HISTORIO

Estas certe ke Mantovo ekstaris kelkajn jarcentojn antaŭ ol Romo, kaj okupadis ĝin Etruska kolonio, kiam, en la jaro 222 antaŭ Kristo, ĝi estis konkerita de la Romanoj. Ĝi suferis al la invadoj de la barbaroj — Hunoj,

Vandaloj, Heruloj, Gotoj, Longobardoj. — En la mezepoko estis imperia feŭdo donita al *Canossa*-familio, laste al grafino *Matilde*; poste Libera Komunumo de la Lombardaj Ligoj. Ekregis ĝin en 1268 familio *Bonacolsi*, la unuaj Popo-

laj Kapitanoj; al tiuj postvenis en 1328 la Gonzaga-familio, kiu regis Mantovon kvar jarcentojn. Sub tiu regado Mantovo akiris grandegan politikan gravecon kaj fariĝis ejo de scienco kaj arto, estis admirata kaj enviata de ĉiuj Eŭropaj regnestroj kaj popoloj.

Sed en la jaro 1630 ĝi estis almitita de la imperianoj, gravege trarabita kaj abomene difektita; post tiam ĝi neniam plu reakiris sian antaŭan prosperon kaj multnombrajn loĝantaron. En la jaro 1707 ĝin superregis la Aŭstria Imperio kaj poste, diversfoje, alterne, Francoj kaj Aŭstrianoj. Mantovo estis loko de ribelo kaj sinofero de patriotoj sopiregantaj al nacia memstareco, ekzekutitaj ĉe *Belfiore*, kaj, fine, en la jaro

LA MANTOVA PROVINCO

La Mantova provinco etendiĝas de Garda lago ĝis rivero Po kaj preter tiu, konsistas el 70 komunumoj. Ĝin trafluas la riveroj *Po*, *Mincio*, *Oglio*, *Secchia* kaj multaj riveretoj.

Ĝi havas 2339 kv. km. da supraĵo kvazaŭ tute ebena. Ĝi eltiras siajn vivrimedojn precipe el la agrikulturo, kiu estas la plej grava sinokupado de la loĝantaro, kulturanta sufiĉacie 215,121 terhektarojn.

La plej gravaj industrioj estas tiuj, kiuj prilaboras le terproduktaĵojn aŭ elproduktas materialojn kaj maŝinojn por la terkulturado. Inter la aliaj plej gravaj: la cerealkulturo, la bredado de bovoj, ĉevaloj kaj porkoj, la kulturo de semplantetoj, la buter- kaj fromaĝindustrio, la kulturo kaj senseligado de l' rizo, k. c.

La Mantova provinco prezentas favorajn cirkonstancojn por plia industria disvolvigo. Laŭlonge rivero Min-

1866, reakirinte liberecon, ĝi unuĝis al patrujo.

MANTOVO enhavas 41.000 loĝantojn kaj kuŝas en la granda Po-ebeno, je 20 metroj super la marnivelo. Ĉirkaŭita kvazaŭronde de la rivero Minĉo, kiu tie larĝiĝas kaj lagigiĝas, ĝi estis iam, pro tia situo, fortikajita kaj taksata nepre malkonkereblan; pro tio ĝi ludis gravan rolon en la tiamaj militoj.

Nun, tute liberigita de tiuj fortikaĵoj, kiuj ĉirkaŭsufokis ĝin, estas renovigita per belaj modernaj domoj kaj palacoj.

La urbo estas riĉa je belegaj mezepokaj konstruaĵoj kaj famartaj trezoroj, precipe de Gonzaga epoko, kiam en ĝi loĝadis unu el la plej famaj Eŭropaj kortegoj.

ĉo, inter Garda kaj Mantova lagoj, oni povas ekspluati gravan hidraŭlikforton. Bonega porŝipa akvovojo Mantovo-Venecio, tra riveroj Minĉo kaj Po, taŭgas por la pezaj transportaĵoj.

La urbo malproksimas 148 km. de Milano, 145 de Venecio, 251 de Ĝenovo, 274 de *Brénnero* (limstacio).

La plej rimarkindaj industriaj produktaĵoj estas: butero, fromaĝo, tomat-ekstrakto, tritik- kaj maizfaruno, rafinita rizo, porkaĵoj, vino, vinbrando, kan- kaj junkplektaĵoj, junkkorboj, balailoj, krud- kaj pakajpapero, terkulturmaŝinoj, mebloj, ludiloj, specialaj brikaĵoj, ktp.

La plej gravaj terkulturaĵoj eksportebaj estas: silkkokonoj, aveno, fojno, tritik- kaj rizpajlo, ĉevaloj, porkoj, rizo, vino, ktp.

La Komerca-Industria Ĉambro de Mantovo liveras komercajn sciigojn kaj adresojn, kaj korespondas en Esperanto.

RAPIDA RONDIRADO TRA LA URBO

Elirinte el la fervoja stacidomo oni deflankiĝu dekstrèn, kaj, post centoda paŝoj, oni eniras la belan kaj larĝan ĉefstraton *Corso Vittorio Emanuele*. Tiu *Corso* etendiĝas maldekstre, komencante tie ĉe la urba elirejo *Porta Belfiore*, ŝtona arkaĵo, restaĵo de la malnovaj fortikaĵoj, kiuj iam ĉirkaŭadis Mantovon. Ekster la posto estas la urba ĝardeno. Trairante la ĝarde-

Ognissanti (Ĉiuj Sanktuloj); interne belega pentraĵo: « S. Johano Baptisto » de nekonata attoro de XV jarc., kaj bela fresko: « La Virgulino sur trono » de Stefano el Zevjo.

Ĉe N. 43 teatro *Andreani*; ĉe N. 10 la bela kaj moderna ŝtona palaco de *Banca Mutua Popolare*. Maldekstre, kontraŭe al tiu palaco, interesa domangula ŝtono, elegante prilaborita je ara



Teatro Sociale


non kaj transpasante sur la vojpono de la fervojo, oni alvenas, malproksime unu kilometron, al loko *Belfiore*, kie ĝardeno kaj tomboŝtono memorigas ke tie en la jaroj 1851-52-53 la tiam reganta Aŭstria Imperio elpendigis dek italajn patriotojn; tie ĉirkaŭe nun etendiĝas la nova urbo: modernaj konstruaĵoj, vilaoj, fabrikoj. Sur sama vojo, du kilometrojn pli antaŭe, estas la urba tombejo (tramvojo).

Reveninte ĉe la komenco de la ĉefstrato *Vittorio Emanuele*, oni iru laŭlonge tiu. Tuj, dekstre, la preĝejo de

beskoj, folioj, birboj; ĝi estas valora skulptaĵo de Luko *Fancelli* (XV jarc.).

Je la fino de *Corso*, ĝuste kontraŭe, la Teatro Sociale, konstruita en la jaro 1822 en novklasika stilo. Dekstre de teatro, la ĉefstrato *Corso Umberto I*; tie komenciĝas la portikoj kaj la plej rimarkindaj magazenoj, kafejoj, ktp. Laŭirante tiun straton oni alvenas al la triangula placo *Purgo*, same ĉirkaŭita de portikoj kaj de malnovaj domoj. Tiu placo estas la centra renkontejo de la urbo, la plej ofta popola alirejo; jaŭde, okaze de la semajna merkato, ĝi estas

plenplena je komercistoj, kiuj tie traktas siajn negocojn. Tie kruciĝas la urbaj tramoj; de tie kvar tramvojoj kondukas al kvar urbaj elirejoj: unua, tra la ĝis nun nomitaj stratoj, kondukas al *Porta Belfiore* kaj al la fervoja stacidomo; dua, daŭriganta la antaŭan, al *Barriera Virgilio*; tria, sude, al *Porta Pusterla* (apud la fama palaco



Komerca Ĉambro

Te'); kvara, kontraŭa al la tria, al *Porta Molina*.

De placo *Purgo* oni iru tra la strato *Pietro Fortunato Calvi*; tie la palaco de la Komerca Ĉambro, barokstila, konstruita en la jaro 1914 de arkitekto Aldo Andreani; en tiu estas tri rimarkindaj freskoj de jaro 1450 montrantaj tri Konsulojn de la antikva *Università dei Mercanti* (Komercesta Universitato). Post tiu palaco, alia moderna de *Banca d'Italia* (Itala Banko) kaj


la Sinagogo kun nova fasado (1925).

Oni revenu en placon *Purgo*, kaj de tie iru en la apudan placon *Andrea Mantegna*. Tie staras la Baziliko de S. Andreo, gravega kreaĵo de l' fama arkitekto Leono Baptisto Alberti (vidu apartan ĉapitron).

Dekstre de la Baziliko estas *Piazza delle Erbe*, karakteriza placo, ven-

metron pli malalta, kuŝas ronda « Baptejo » nomita *Rotonda di S. Lorenzo*, de XI jarĉ., restarigita antaŭ nemulte kaj interne ankoraŭ riparota. Apude starigas *Palazzo della Ragione* kun horloĝturo, granda konstruaĵo de jaro 1250, iam sidejo de la urbaj magistratoj, nun multe ŝanĝita kompare kun la originala stilo; ĝi estos restarigata kaj difinata por sidejo de la urbestro.

tiu palaco, en la samnoma placo, estas niĉo kun maldelikata statuo de Virgilio figurita sidleganta, la mondfama Mantova poeto, la plej granda el la latinaj; la monumento datas de la konstruado de la palaco, t. e., kiel memorigas subskribaĵo, de jaro 1227. En la flanko de la placo, kie estas la portikoj, sur la fasado de tieaj domoj, oni vidas restaĵojn de antikvaj freskoj:



Placo Sordello

(De maldekstre dekstren): Palaco Bonacolsi - Episkopa Palaco - La Katedralo - La Duka Palaco
Meze: Monumento al *Martiri di Belfiore*

La nuna horloĝo estas restaĵo de la fama astronomia komplikita horloĝo, konstruita en jaro 1473, de astronomo Bartolomeo Manfredi; ornamas la turon niĉo kun Madono.

En la fundo de la placo, palaco *Brolotto* aŭ de *Podestà*, kaj post tiu, la placo *Broletto*. La palaco estas kvadrata, kun turoj en la kvar anguloj kaj dentita mursupraĵo; ĝi estis sidejo de la urbestro. En la fasado de

zonon kun infano, kaj inter du fenestroj, kavaliro kun fera kamizolo sur blanka ĉevalo: estas Federiko II, duko de Mantovo. La domo estis sidejo de la antikva *Università dei Mercanti*, kaj, sur unu el la belaj kapituloj de la kolonoj, interne de la portiko, estas ties insigno, t. e., aglo sur pakaĵo, insigno nuntempe ankoraŭ de la Komerca Ĉambro.

Dekstre de tiu domo, fine de la por-

tiko, estas palaco *Andreasi*, en Firenza stilo, konstruita en la XV jarĉ., kun bela brikornamajaro.

Oni nepre rimarkis la kontraston de stilo kaj formo de la portikoj, kiuj certe estus pli belaj unuformaj kaj unustilaj; sed la multaj neniusimilaj kapiteloj el ties kolonoj, arte kaj plaĉe ellaboritaj, altiras ĉies atenton kaj sinceran admiron.

Post la palaco *Andreasi*, maldekstre, en la apuda strato *Cavour*, staras la Turo de la Kaĝo, alta 55 metrojn, de la XII jarĉ., tiel nomita pro la kaĝo alkroĉita al ĝi. Paŝante sub arkajo oni eniras la belan kaj grandan placon *Sordello*, ĉirkaŭitan de la plej karakterizaj mezepokaj konstruaĵoj. Tuj enirinte en la placon, maldekstre, oni vidas la malnovan palacon de familio *Bonacolsi*, iamaj Kapitanoj de l' Popolo, kiuj regis Mantovon antaŭ la familio Gonzaga; murdentita, kun larĝaj arkajaj fenestroj kun marmoraj kolonetoj, ĝi estis konstruigata de *Pinamonte Bonacolsi* je la fino de la XIII jarĉ.; sed ĝi suferis diversajn aliformigojn kaj la nuna portalo kun tre plaĉaj skulptitaj marmoraj estas de la XVI jarĉ.; en la riĉa arkivo en tiu palaco oni konservas la aŭtografon de « *Il Cortegiano* », fama verko de *Baldassare Castiglione*. Fine de tiu placo flanko estas la Episkopa Palaco kaj apud tiu la *Duomo* (Ĉefpreĝejo) (vidu apartan ĉapitron). Alia flanko de la placo estas okupita de la interseĝaj konstruaĵoj (palaco kaj kastelo) de la Gonzaga Reĝejo, riĉegaj je memoraĵoj kaj famegaj ĉefverkoj (vidu la specialan ĉapitron). Meze de la placo staras la monumento al la Martiroj de *Belfiore*, la dekunu Italaj patriotoj mortigitaj de Aŭstria Imperio, kiam ĝi re-


gis la Lombardo-Venecian regionon.

De placo *Sordello* oni eliras el la urbo tra la elirejo *Barriera S. Giorgio* kaj per vojpono oni transiras la lagon. De tie oni ĝuas belan vidaĵon de la urbo, elstaranta sur la akvo kun siaj kastelo, turoj kaj pintaj tegment-suproj de la preĝejo. Trans la lago estas la Hebrea tombejo.

Oni revenu en placon *Sordello* kaj de tie en placon *Broletto*, kaj, paŝante sub la flanko arkajo de palaco *Broletto*, oni eniru en la straton *Roberto Ardigò*; laŭiru tiun kaj tuj, dekstre, apud la fermita preĝejo de la Sankta Triunuo, troviĝas la domo de S. Luizo Gonzaga kun memorŝtono; pliantaŭe, placo *Dante* kun meze ties monumento. Unu flanko de la placo estas okupita de la palaco de la Reĝa Virgilia Akademio, kiu enhavas originalan teatron konstruitan de arkitekto Antono *Galli Bibbiena*; la teatro taŭgas por kunvenoj, paroladoj, ktp. Alia flanko de la placo okupas la Palaco de l' Studoj; sur ties fasado, altreliefa medalliono de Roberto *Ardigò*, Mantova filozofo. La palaco enhavas gimnazion, liceon, kaj aliajn lernejojn, la Komunan Bibliotekon, la Gonzagan Historian Muzeon. La Biblioteko, fondita de Imperiestrino Mario Terezo en 1779, estis riĉega je multvaloraj libroj; bedaŭre la Francoj, dum sia okupado en 1797, forportis la plej valorajn; malgraŭ tio en ĝi troviĝas ankoraŭ multaj manuskriptoj, miniaturretaj kodoj, palimpsestoj, inkunabloj, maloftegaj kaj multvaloraj libroj kaj ankoraŭ ĉirkaŭ 150.000 aliaj volumoj; en la leĝoĉambro estas multaj pentritaj portretoj de Mantovanoj famaj en la literaturo kaj en la scienco. La Gonzaga Historia Muzeo enhavas dokumentojn pri la longa

kaj glora, precipe por la artoj, Gonzaga regado; sed same ĝi estis senigita de la Francoj, en 1797, de la plej artaj kaj valoraj verkoj, kaj antaŭe, en 1630, ĝin jam difektis la sieĝo kaj rabado de Mantovo; ĝi posedas ankoraŭ riĉan kolekton da aŭtografaj de la plej famaj artistoj kaj literaturistoj kiel: *Mantegna*, Perugiĉo, Leono Baptisto Alberti, Julo Romano, Paŭlo Rubens, A-

ekaperas la sidejo de la Mantova Esperantista Grupo (kunveno ĉiumarde de la 20 ĝis la 22 horo). De placo Garibaldi oni iru dekstren tra strato *Giovanni Chiassi*; dekstre, la preĝejo S. Maŭrico, interesa, kun valoraj pentraĵoj de Ludoviko *Caracci* kaj ties skolo; ĉe N. 37 domo de la XVIII jarĉ. en rokoka stilo, kaj ĉe N. 45 domo kun riĉa originala dekoracio multkolora;



Preĝejo de S. Sebastiano

retino, Poliziano, Tasso, Ariosto, ktp.

Oni revenu en placon *Broletto* kaj de tie en placon *Purgo*. Per strato *Magistrato*, kie ĉe N. 19 estas la urbdomo, oni alvenas en placon *Garibaldi*. Meze de la placo staras ties monumento, baldaŭ transportota en la ĉefstraton samnoman; dekstraflanke, la palaco de la Poŝto, Telegrafo kaj Telefono. Per nova strato, maldekstre, oni aliras la straton *XX Settembre*, kie ĉe N. 16, distingita per surmura afiŝo,

tuj poste, placeto kaj la preĝejo S. Barnabo, en kiu estas bonaj pentraĵoj: « La multobligo de panoj kaj fiŝoj », de Lorenzo *Costa* « la juna »; « La edziĝo de Kanaan », de Aleksandro *Maganza*; « Vizio de S. Romualdo », de *Bazzani*; « S. Sebastiano », de Benedikto *Pagni*; k. a.

Oni iru laŭ la maldekstra strato *Carlo Poma*; ĉe N. 14 la domo de Julo Romano, starigita de li mem, modesta, kun interesa « Merkuro » en niĉo de

la fasado. Aliflanke de la strato, la Palaco de Justeco, granda konstruaĵo desegnita de J. Romano kaj konstruita de lia disĉiplo Bertani; konstruigita de Gonzagoj, ĝi apartenis poste al Grafoj el *Colloredo*; nun estas sidejo de la Justeca Magistrataro; en la fasado de la palaco kolosaj kariatidoj, kaj interne, freskoj kaj pentraĵoj de aliaj disĉiploj de Romano. Oni daŭriru kaj deflanke dekstre laŭ la strato *Principe Amedeo*; fine de tiu strato, dekstre, la palaco de la Teknika Instituto, kie interne estas restaĵo de la domo de Andreo *Mantegna*; tuj poste, maldekstre, la preĝejo de S. Sebastiano, unu el la plej famaj konstruaĵoj de Leono Baptisto Alberti, konstruigita en 1460 de Markizo Ludoviko Gonzaga. Ĝi estis belega monumenta preĝejo, riĉa je freskoj kaj pentraĵoj. Tute difektita de la militoj, ĝi estis uzata kiel soldatejo; nur lastatempe rebonigita, ĝi estas nun difinita por Famejo de la mortintoj dum la lasta mondmilito. Oni eliras el la urbo per la elirejo *Porta Pusterla* kaj per granda aleo oni alvenas ĉe la Te'-palaco, la nepre vidinda belega somerdomo de Princoj Gonzagaj (vidu la concernan ĉapitron).

Revenu urben kaj per tramo veturu ĝis *Porta Molina*. Tie la tegmentita Ponto de Mueliloj konstruita en 1198 de arkitekto Alberto Pitentino; laŭlon-

ge la ponto, en niĉoj super la pordoj de la muelejoj, statuoj de Jezuo Kristo kaj de la Dekku Apostoloj. Kiu havas tempon povas promeni ĝis la proksima Citadelo, iama fortikaĵo, nun malkonstruita. Tie rimarkinda fortikaja pordo konstruita de Julo Romano, kaj, dekstre de la pordo, ŝtona memoraĵo al Andreo *Hofer*, tie alpaŝita de la Franca Armeo en 1810.

Reveninte urben, oni iru laŭ la tramvojo tra strato Trento. Tiekomence la preĝejo de S-aj Gervazo kaj Protazo kun romanika sonorilturo. Pliantaŭe, la palaco de Markizoj *Cavriani* kaj kontraŭe, ĉe la alia flanko de la strato, ties ĝardeno kun statuo de Virgilio en la mezo kaj, sur la pilastroj de la fasadkrado, dektri bustoj de aliaj famaj Mantovanoj. Daŭriru straton Trento ĝis oni eniras la grandegan placon Virgilian, ĉirkaŭitan de granda aleo; tie starigas la impona monumento al mondfama Mantova poeto Virgilio, inaŭgurota en oktobro 1926. La monumento estas verko de arkitekto Luko Beltrami; la statuon, bronzan, altan 5,30 metrojn kaj pezan 2800 Kg., ellaboris skulptisto *Quadrelli*, kaj la du grandaj alegoriaj skulptaĵgrupoj estas de Mantova skulptisto *Menozzi*.

Tra strato *Fratelli Cairoli*, en la kontraŭa flanko de la placo, oni revenas en la placon *Sordello*.

LA GONZAGA REĜEJO

Princoj ne malsimilaj el multaj aliaj, kiuj superregis la diversajn regionojn de Italio, la Gonzagoj havis komunajn al ili personajn kaj politikajn virtojn kaj meritojn, malvirtojn kaj mankojn.


Tamen ĉi tiuj lastaj estas grandparte forgesigitaj danke al la belegaj arttrezoroj per kiuj, kun klera oferemo, ili abunde provizis la Dukan Palacon; kvar jarcentoj da reĝeca famego glo-

rigis Mantovon, kiun, laŭ aserto de J. Vasari, ne plu Mantovon sed novan Romon oni povis nomi.

Markizo Ludoviko Gonzaga invitis en la kortego artistojn kiel *Mantegna*, *Poliziano*, *Alberti*, kaj lian ekzemplon imitis markizo Francisko kaj lia edzino Izabelo el Este, la bela kaj klera markizino, amikino kaj protektantino de la plej famaj tiutempe vivantaj artistoj, kiu kolektis en siajn salonojn, belegajn kaj graciajn ĉefverkojn.

kastelon de *Bosco Fontana*, la luksan vilaon en Maderno kaj bonvenigis en sian kortegon *Tasso*'n kaj multajn aliajn.

Sed Gonzaga-Familio estis jam deklinigonta: por reakiri la perditajn riĉaĵojn *Vincenzo II* vendis al Karlo I el Anglujo la verkoplenan « Galerion », en kiun liaj antaŭuloj estis kolektintaj multvalorajn pentraĵojn de *Tiziano*, *Correggio*, k. a. Lian malnoblan faron daŭrigis Karlo V el *Nevers*, kiu lasis



Gonzaga Reĝejo: La Duka Palaco

Frederiko Gonzaga daŭrigis ĉi tiun belan tradicion de inteligenta malavareco kaj, depende de li, *Cellini*, *Romano*, *Lionbruno*, *Costa*, k. a. plibeligis kaj riĉigis Mantovon, kie iniciatinta de Julo Romano, formigis tiu grandnombra lernantaro, kiu florigadis multajn bonfamajn artistojn kaj gravajn verkojn.

Ĉefepiskopo Herkuleso Gonzaga akiris, por la Duka Palaco, la miridajn tapetojn el Flandrujo, faritajn laŭ la kartondesegnoj de *Raffaello*, kaj post nemultaj jaroj konstruigis la belegan palacon « Favorita », la malgrandan

migri al Anglujo pentraĵojn de *Mantegna*, *Raffaello*, kaj skulptaĵojn de *Sansovino*, *Michelangelo*, *Prassitele*, k. a.

El tiu registaro, kiu faris el Mantovo gloran urbon de kulturo kaj arto, restas al ni, senmorta memoraĵo, la Duka Palaco, kiun ĉiuj princoj konkuradis ampleksigi tiom multe, ke, pli ol ia grandampleksa, ordigita, homogene tutaĵo, ĝi ŝajnas al ni kvazaŭ kaosa kunamasigo da konstruaĵoj interplektitaj kaj surmetitaj unuj sur la aliaj en senorda fantazia intersekvo, en kiu reflektiĝas la tumultplena sortovico,

tra kiu travivis dum kvar jarcentoj unu el la plej longedaŭraj, turmentitaj kaj prosperaj Italaj regintaroj.

Kvincent ĉambroj, sescent pordoj, okcent fenestroj, dekvin ĝardenoj, plaĉoj, kortoj, teatro, preĝejo, ĉiom ampleksanta 34.000 kvadratmetrojn, jen kelke da ciferoj elokventaj pri tiu princloĝejo, vasta vetlaborejo de famaj artistoj, kiuj diversepoke en ĝi laboradis postlasante la signojn de sia talento kaj de la strangaĵoj kaj plaĉoj de princoj artamantaj, kaj kie silento kaj allogo de l' mortintaĵoj paroladis la lingvaĵon de historio, de arto, de luksego, de malfeliĉo.

La Gonzaga Reĝejo, kiel oni kutimas nomi tiun princloĝejon, ampleksas la Dukan Palacon, kies ĉefaj konstruaĵoj estas la Palaco de l' Kapitano kaj la *Magna Domus*, kaj la Kastelon.

De tago al tago kvazaŭ sorĉe, ĝi reakiras vivobrilon dank' al saĝaj rebonigoj en ĝi nuntempe farataj. Ĉie en ĝi elstarigas milmiloj da pasintecaj fantaziaĵoj, luksegaj postsignoj de beleco, raĝaj kapricoj, multaj suferoj, nekonataj martiroj. Multaj jarcentoj da krimoj, doloroj, hontoj, heroaĵoj, malfeliciaĵoj, kiuj subite amasiĝas ĉirkaŭ ni, vivigas la solecajn ejojn, kie nenia estaĵo ŝajnas vivi krom la ideala vivo, kiun ĉiu scias krei ĉirkaŭ si mem kun la aspiro al ĉiama humaneco kore kunbatanta kun ni trans ĉiu limotempo.

Post iomtempa irado tra l' salonoj, kiel uksego kaj malfeliĉo ŝajnas esti lasintaj tragedian postsignon, la eliro, dum varma tago, en la vastan placon sunoplenan ŝajnas al ni abrupta alvoko al realeca vivo post sagaca ŝajnigo sceneja, kiu longe kaj intime estas ĉirĉaŭliginta la spiriton.

LA DUKA PALACŌ

Por viziti la Dukan Palacon, oni nun eniras tra larĝa pordo je N. 12 en plaĉo *Sordello*, dume oni iam eniris ĉe alia flanko de l' palaco, kie fariĝis poste arboriĉa plaĉo nomita *Lega Lombarda*.

Per vasta ŝtuparo tutornamita per gipsaj kopiaĵoj de malnovartaj ĉefverkoj, oni eniras antaŭĉambron, kie estas ordigita la Egipta Muzeo, kies interesplenaj objektoj eŝtis kolektitaj de iama Aŭstria konsulo en Egiptujo S-ro Jozefo *Acerbi*, Mantovano, kaj de li testamente donacitaj al la urba komunumo.

En apuda salono komenciĝas kolekto da antikvaj skulptaĵoj Grek- kaj Romepokaj, kolekto kiu estas inter la plej bonaj kaj plej riĉaj de Italio. Poste, tra alia sensignifa ĉambrego, oni eniras salonon, kie sur muro oni admiras pentrorestaĵojn de la XVI jarĉ., kiuj prezentas la « Krucumon », versaĵne de *Pisanello*.

Apude troviĝas la *Appartamento della Guastalla*, ĉambraro kie estas kolektota la Numismatika Muzeo. Oni tuj eniras en la *Sala dei Duchi* (Salono de l' Dukoj) tiel nomata pro multnombraj medalionoj freskitaj je l' supro de la muroj kun portretoj de la tuta Gonzaga regintaro, de Luizo I (1132) ĝis la lasta duko Ferdinando Karlo (1701).

Centra pordo enirigas en la *Sala dei Papi* (Salono de l' Papoj), ĉar iam estis en ĝi pentritaj papoportretoj. Trairante la *Appartamento dell' Alcova* oni sin direktas al *Sala Nuova* (Nov-Salono), kie, laŭlonge la muroj, troviĝas marmorbustoj de Romaj imperiestroj kaj notindaj sarkofagoj. En la ĵus nomitaj kaj en la sekvantaj salonoj oni vidas grandnombrajn kaj diversepokajn

skulptaĵojn, kiujn ni nepovas katalogi pro la malgranda amplekso de nia kajereto.


Reveninte en le Salonon de l' Papoj oni eniras en la *Appartamento degli Arazzi* (Ĉambraro de l' Tapetoj), intence konstruita en 1779 por tien kolekti unu el la plej malnovaj tapetserioj de Rafaelo. Kardinalo *Ercole* Gonzaga ilin donacis testamente al Palatina Baziliko; de tie en 1776 oni ilin translokigis al Duka Palaco, kie ili

faritaj de Mantova pentristo Felico *Campi* fine de 1700. La scenoj estas eltiritaj el alia *Raffaello*-tapetserio ekzistanta en *Vaticano*.

II SALONO: « Ekfalo sur la vojo al Damasko »; « Predikado en la Aeropago »; « Inklino de S. Petro ».

III SALONO: « Mirakla fiŝkaptado »; « Magiisto *Elima* blindigita »; « Ŝtonmortigo de S. Stefano ».

De la *Appartamento degli Arazzi*



Gonzaga Reĝejo: Portikoj de la Duka Palaco

restis longatempe forlasitaj, ĝis kiam, sekve de rebonigo, oni redonis al ili la antaŭan brilegon kaj valoron.

En 1866 la multkostaj tapetoj estis ŝtele forportitaj al Vieno en *Schönbrunn*-kastelo, kaj nur en 1919 ree transportitaj al Duka Palaco. La tapetoscenoj, kiujn Rafaelo kartondesegnigis por Sikstina Kapelo en Romo, estas eltiritaj el la Aktoj de la Apostoloj.

I SALONO (de maldekstre dekstren): « Resanigo de la paralizito dank' al S. Petro »; « Oferbuĉo en *Listra* »; « Morto de *Anania* ». En tiu ĉi, sam' kiel en la sekvantaj salonoj, sur la muroj ĉe la ĝardena flanko, troviĝas tapetimitaĵoj

oni rekte aliras al la *Sala dello Zodiaco* (Zodiak-Salono), kie sube de l' arkajo malhelblue freskita, *Lorenzo Costa* la juna, reproduktis la dekdu zodiaksignojn. Oni vidas ĉi tie la liton el verda silko, sur kiu kuŝis Napoleono I en 1797 kaj en 1806.

Maldekstra pordo enirigas en la *Sala dei Fiumi* (Salono de l' Riveroj), kie en 1776 *G. Anselmi* el Verona per diaĵfiguroj simbolis la ses riverojn de Mantova regiono. Meze de la plafono fresko de l' sama pentristo prezentas « *Euterpe*'on kun citro »; supre de la enirpordo estas nigrulbusto el marmoro de lerta aŭtoro.

Malgranda ŝtupareto suprenirigas al *Appartamento di Maria Teresa* (Ĉambro de Mario Terezo); nur unu ĉambro alnomita «Ĉambro de *Beauharnais*» pro mallonga restado de tiu princo en Mantovo, havas ion interesan.

Reveninte tra la *Sala dei Fiumi* kaj la *Sala dello Zodiaco*, oni eniras en la *Sala dei Falconi* (Falk-Salono) kie lastatempe (1923) estis malkovritaj belaj dekoracioj laŭ *Correggio*-skolo.

Oni poste eniras en la apudan *Saletta dei Mori* (Saloneto de l' Nigruloj), kiu havas orumitan plafonon lignoskulptitan; la tuta ornamo konsistas el groteskaj kaj tre graciaj kapetoj de nigruloj.

Trairante la *Corridoio dei Mori* (Nigrul-Koridoro) vidiĝas bonegaj dekoracioj en la volbo kaj oni atingas la tre luksan *Galleria degli Specchi* (Galerio de la Speguloj), el ĉiuj ejoj la plej multenhavan je orumaĵoj kaj pentraĵoj XV-jarcentaj (*Lorenzo Costa* la juna, *Ipolito Andreasi*, *Julo Rubone*, k. a.). La arkaĵo dividiĝas je tri grandaj medalionoj; en la flankaj Apolo kaj Diano gvidantaj respektive la Sunkaj Lun-kvadrigoj; en la centra medaliono ĉiuj Olimpodiaĵoj festantaj. Mirindajn perspektivajn efektojn vidigas ĉi tiuj pentraĵoj.

Supre de l' pordo, kiu kondukas al la *Sala degli Arcieri*, en duonrondo estas figurita la «Parnaso kun Apolo» kiun ĉirkaŭas la naŭ Muzoj. Oni vidas sube portretojn de la plej famaj Mantovanoj: *Virgilio*, *Sordello*, *Castiglioni*, *Pomponazzo*, *Folengo*, k. a. En kontraŭa duonrondo estas diaĵoj figurantaj Belartojn kaj Sciencojn; sur la parietoj estas tre rimarkindaj la kvar starantaj figuroj kaj la ornamaĵo, kiun formas ŝercantaj amoretoj perfestone kunligitaj, hel-malhele pentrita sur ora fono.

Proksime estas la *Sala degli Arcieri* (Salono de l' Pafarkistoj) kun fantaziorica plafono de arkitekturo *Bibbiena*; oni jam delonge komencis la riparon de tiu ĉi salono, ĉar parto de ĝi estas defalinta. Ĝi taŭgis kiel antaŭĉambro por aliri al *Appartamento Ducale* (Duka Ĉambro), kies plafono estas el skulptita ligno orumita; el Salono de l' Pafarkistoj oni aliras al ĝi per pordo apuda al tiu, per kiu oni estas enirintaj. Tiel troviĝas:

I. *Sala del Crogiuolo* (Salono de l' Fanduĵo); ĝi estas tiel nomata, ĉar ties plafonon ornamas fanduĵoj enhavantaj fasketojn da orvergetoj kun latina moto «*Probasti me, Domine*». Pentraĵoj de Mantovano *Bazzani* kaj de aliaj Venetlandaj pentristoj (1700).

II. *Sala del Laberinto* (Labirint-Salono); sub plafono en labirintsimila desegnaĵo oni legas la konatan moton: «*Forse che sì, forse che no*», kiu inspiris al *D' Annunzio* la libron titolitan per ĝi. Portretoj de Familio Gonzaga; inter ili notinda la «Familio de Duko *Vincenzo de Pourbus*», du tapetoj de J. Romano, k. a.

III. *Salono de Domeniko Feti*, kun ornamaĵo de *Lorenzo Costa* la juna; ĝi enhavas unuarangajn pentroverkojn, ekz.: Portreton de Duko Vilhelmo kaj *Vincenzo* kun edzinoj Eleonoro el Aŭstrio kaj Eleonoro *De Medici*, de *Rubens*; «Pan- kaj Fiŝ-multigon», de D. Feti (1600); serion de l' Apostoj, de l' sama aŭtoro; du pentraĵojn de *J. M. Crespi* el *Bologna*, k. a.

Sekvas aliaj ĉambroj je stilo «*Impero*» antaŭnelonge renovigitaj; poste saloneto el ruĝa marmoro, kiu kondukas al *Appartamento di Eleonora* (Eleonora Ĉambro) konsistanta el du *Stanze della Città* (Urboĉambroj) kun

urbvidaĵoj en la multenombraj medaloj; *Gabinetto delle Cicogne* (Ĉambreto de l' Cikonioj); *Sala degli Elementi* kaj aliaj ĉambretoj riĉe ornamitaj. Se al tio oni aldonas la okulplaĉan aspekton de la ĉirkaŭanta lago kaj kamparo, oni tutpravis alnomi ĉi tiun flankon de l' palaco *Appartamento del Paradizo* (Paradiza Ĉambro).

Ŝtuparo samnoma kondukas al *Appartamento dei Nani* (Ĉambro de la Malgrandeguloj), stranga konstruaĵo starigita de Duko Vilhelmo. Ĝi konsistas el kvar malgrandegaj ĉambretoj kaj ŝtupareto samproporcia, kiu finiĝas ĉe la ĝardeno.

Ĉi tie finiĝas la parto de la Gonzaga Reĝejo videbla ĉiutage; la alia parto kun la Kastelo estas videbla nur en la tagoj nefestaj.

Per vasta trairejo proksime al S. *Barbara* placeto oni iras al *Appartamento della Metamorfosi* (Ĉambro de la Metamorfozo), kiu enhavas pentraĵojn, kies scenoj estas eltiritaj el la konata verko de Ovidio. Artaĵoj, argilaĵoj montriĝas en la diversaj salonoj. Sekvas maldekstre la miriga *Galleria della Mostra* (Ekspoziciejo) parte difektita, tamen la malmultaj plafonrestaĵoj komprenigas pri la altvaloraj skulptaĵoj kaj grandiozeco de la kornico.

Per mallarĝa trairejo oni eniras en la *Appartamento della Mostra* (Ekspozicia Ĉambro), kie estas disdonita la Arkeologia Muzeo. La diversaj salonoj freŝe restaŭritaj kun interesaj stuklaboritaj plafonoj ricevas la nomon de: *Sala della Caccia* (Ĉasosalono), *Gabinetto d' Orfeo* (Orfeo-Ĉambreto), kaj *Sala dei Pesci* (Fiŝsalono).

Oni trairas la *Sala dei Frutti* (Fruktojsalono) per koridoro havanta balkonon flanke de la granda korto nomata «*Cavallerizza*»; oni malsupreniras al *Loggia di Eleonora* (Eleonora Loĝio), kie oni admiras belegan plafonon groteske laboritan. Apude troviĝas la *Sala dei Marmi* (Marmorajsalono) en kiun la lastaj dukoj estis kolektintaj parton de la antikvaj marmorlaboraĵoj, kiujn oni poste translokiĝis al Statua Muzeo.

Sekvas la *Sala di Troja*, kie skollanoj de J. Romano freskis la Trojalegendon laŭ desegnoj de la majstro. Sur la parietoj: «*Juĝdecido de Pariso*», «*Helenrabo*», «*Ligna Ĉevalo kaj ruza Simono*», «*Laokoonto*», «*Sonĝo de Andromako*», «*Tetiso kaj Vulkanono*», «*Livero de l' armiloj al Ahilo*», «*Ajakso fulmofrapita de Minervo*». Ĉirkaŭe de la volbo, epizodoj de la Troja milito; centre «*Olimpo*».

Apud ĉi tiu salono troviĝas la *Sala di Giove* (Zeŭso-Salono) poste, la *Cammerone dei Cavalli* (Ĉevaloj-Ĉambreto), ambaŭ kun belegaj dekoracioj. Dekstra pordo alirigas al kelke da salonetoj: *Loggetta* (loĝieto), *Gabinetto dei Falconi* (Falkĉambreto), *Gabinetto degli Imperatori* (Ĉambreto de la Imperiestroj), kie iam estis konservitaj portretoj de Romaj imperiestroj pentritaj de Tiziano, *Stanzino degli Uccelli* (Birdoj-Ĉambreto), k. a.; bele plenumitajn kaj plaĉajn stukajojn oni admiras en ili.

Trapaŝinte la vastan *Sala di Manto*, kie vico da gravaj pentraĵoj sciigas pri la Manto-legendo kaj deveno de la urbo, irante dekstren oni alvenas al du vastaj salonoj, la unua nomata *Sala dei Capitani*, la dua *Sala dei Marchesi*, kun delikataj ornamaĵoj riĉaj

je harmonio kaj nobelgusto. Laŭlonge de la lagbordo sekvas kelkaj salonetoj parte difektitaj de la tempo: *Loggia del Tasso*, *Camerini di Apollo*, kaj aliaj je la unua etaĝo.

Necesas nun reveni al Manto-Salono, kaj malsuprenirante la Bertani-Ŝtuparegon, tiel nomata laŭ nomo de l' konstruinto, oni alvenas al enirkoridoro de

LA KASTELO

Ĝi estis konstruita de Bartolino el Novara en 1395 laŭ ordono de Francisko Gonzaga. Kiel fortikaĵo tiutempa ĝi estis unu el la plej timegindaj, kun kvar pintokronitaj turoj kaj ĉirkaŭita de profunda fosaĵo akvoplana. En la korto pro freŝdataj laboresploroj oni malkovris portikon, kies mirinda linieleganteco montras la potencon arton de *Mantegna*, kiel tion ankaŭ atestas dokumentoj antaŭnelonge trovitaj en la Gonzaga Arkivo.

Per vasta ŝtuparo ŝraŭbforma oni supreniras en novriparitan ĉambro nomitan *Sala degli Stemma* (Salono de l' blazonŝildoj), kien estas zorge kolektitaj kelke da Gonzagaj blazonŝildoj kaj aliaj de nobelaj Mantovaj familioj. Ĉi tiu parto de la kastelo estis plurfoje reordigita kaj ĉi tie estis la unua apartamento de Izabelo el Este; nuntempe troviĝas en ĝi la Marmora Muzeo de l' Renesanco.

La unua salono nomita *Sala dei Soli* (ĉambro del' Sunoj) enhavas belan skulptitan kamenon de la XV jarĉ., etan basreliefon « Mito de Filottete », kiu devenas el « *Gabinetti* » de Alfonso el Este en Ferrara, ellaboritan skulptaĵon, kiu prezentas « Kriston inter Anĝeloj » k. a.

La dua salono taŭgis kiel litoĉambro

al Izabelo; la sekvanta kun belega stukplafono de Johano el *Udine* kondukas per pordo al *Grottino d' Isabella* havanta plafonon, kies artaĵoj ilustras la « Entreprenojn » de la eminenta Markizino, poste al *Studiolo* kun portreto de Izabelo kaj busto de ŝia edzo Markizo Francisko II. Alia pordo kondukas al *Sala delle Armie* (Armilejo), kie estas freskitaj la armaĵoj de diversaj Gonzagaj Princoj.

Reveninte en la salonon de la Sunoj, oni enpaŝas en la *Camera degli Sposi* (Geedza Ĉambro), unu el la sanktejoj de la Itala pentrarto, tute freskita de *A. Mantegna* de 1461 ĝis 1474. La freskoj estas vera pentrarta poemo, en honoro de l' Markizo Ludoviko II kaj de lia edzino Barbara el Brandeburgo. Supre de l' kameno la granda fresko prezentas la tutan familion de l' Markizo, kiu ĉeestas la legadon de Papa brevo, per kiu oni elektas la duan naskiton Franciskon kardinalo.


Ĉe alia parieto la sceno, per pordo duparte dividita, prezentas la alvenon el Romo de Kardinalo Francisko okaze de la ekstarigo de la Baziliko S. Andreo (1472); Patro kaj fratoj ekmoviĝas al li renkonten. La figuroj montras la kardinalon kaj la patron kiel ĉefpersonojn, la fraton de l' kardinalo Ludovikon, la du knabetojn, el kiuj la plej aĝa estonte fariĝos Markizo Francisko II, edzo de Izabelo. Inter la diversaj figuroj, en fiereca sintenado oni ankaŭ rimarkas tiun de *Mantegna* mem.

Supra parto de l' turoj kaj subtegmentoj servis kiel politikaj malliberejoj, sanktigitaj de la *Martiri di Belfiore* (1852-55). Ĉi tie estis enkarcerigitaj *Tazzoli, Poma, Speri, Montanari, Calvi, Orsini, Menotti, Grazioli*, kaj aliaj patriotoj partoprenintaj la sendependan

movadon dum Aŭstria superregado. En ĉi tiuj « *celle* » (malliberejoj) estas nun ordigitaj kaj enmetitaj portretoj, memoraĵoj, aŭtografoj rilatantaj ĉiujn martirojn.

El la malliberejoj, per unu el la malnovaj ŝtuparoj de l' kastelo, oni revenas al la teretaĝa enirkoridoro; oni poste supreniras ŝtuparegon, kaj anstataŭ eniri la Manto-Salonon, oni sin turnas dekstren al Bertani-koridoro, kie oni

taj dekoracioj estas difektitaj; atentinda, delikata plastikaĵo XVI-jarcenta alskribita al J. C. Romano. Tra koridoro, en kiu vidiĝas ankoraŭ postsignoj de malnova ornamaĵo, oni iras al *Studiolo* (Studĉambro) fama pro belega plafono kaj delikate ellaboritaj marmorpordetoj; dua kabineto, *La Grotta*, havas ŝatindajn gravuraĵojn kaj gracian plafonon el orumita ligno. Aliaj salonoj, kie restas postsignoj de la mult-



Gonzaga Reĝejo: La Kastelo

vidas kelkajn gipsaĵojn, kaj per duobla ŝtuparo, kiu ĝin dividas, oni malsupreniras tra la « Malgrandegula Ĉambretaro » al *Giardino d' Onore* (Honorgardeno).

Ĉirkaŭirante la du flankojn de l' portiko, antaŭ ol atingi elirejon, aperas maldekstre la *Appartamento della Grotta* (Grotĉambro) konstruita en 1522 laŭ ordono de Izabelo komence de ŝia vidvineco. Ĝi riĉiĝis ĝin per gravaj artverkoj, sed bedaŭrinde el tiuj verkoj nuntempe nenio plu restas.

Unua salono havas plafonon ornamitan per groteskoj sur blanka fono kaj ĉaŝscenoj, de L. Leonbruno; la parie-

fama Markizino, kompletigas la apartamenton.


Por kompletigi la viziton de la Gonzaga Kortumo necesas viziti la Bazilikon S. Barbara, de kiu ĝi estas parto alplenigan. Ĝi estis konstruita de arkitekto J. B. Bertani dum 1562-65. Ekstere la vestiblo, je tri arkaĵoj, pilastroj, kornicoj, dekoracioj, k. c., formas tutaĵon harmonioplennan kaj severan. Interne ĝi estas trinava: la centra navo etendiĝas ĝis la ĥorejo, la aliaj havas plimalgrandan dimension. Pentraĵoj de *Andreasino, L. Costa* la juna, *Bazzani* riĉigas la templon, sed precipe notinda la granda pentraĵo de *Domenico Del-*

Riccio (Brusaporci) figuranta la Martirigadon de S. Barbaro.

Estas ankaŭ verko de Bertani la admirinda sonorilturo. Oni diras ke ĝi estas la plej bela sonorilturo de Italio.

Certe arkitekto Algarotti kaj aliaj kompetentuloj troigis dirante tion, tamen se ĝi ne estas la plej bela, estas sendube konsiderinda ĉefverko de konstruanto.

LA TE'-PALACO



La Te'-Palaco

Konstruita dum tuta jardeko (1525-35) ĝi estas juĝata unu el la belaj princologejoj de la Renesanco, kaj kun la duka palaco, ĝi estas miriga atestajo de luksego kaj nobelgusto, per kiuj Gonzagoj kutimis konstruigi siajn restadejojn. Tre simpla estas ĝia arkitekturo kaj la eksteraĵo memorigas la severan stilon, kiun Bramante multe ŝatis.

Julo Pippi, kromnomata Romano, fine de 1524 venis Mantovon kaj ri-

cevis de Frederiko Gonzaga la tujan taskon starigi palacon ekster la urbo ĉe loko nomata Te'. Sub lia zorga gvidado tie laboradis famaj artistoj kiel *Lorenzo Costa*, Benedikto *Pagni*, Rinaldo Mantovano, Francisko *Primaticcio*, k. a.

La konstruaĵo estas unuetaĝa, kvadrata; la ĉefa enirejo estis en la okcidenta fasado, sed nun oni eniras ĉe la vestiblo en la maldekstra flanko. Tie loĝas la gvidgardisto.



Te'-Palaco; Salono de Psiĥo - Venuso kaj Marso en la bano


Oni eniras en alian internan partikon, bele pentritan; antaŭ tiu estas la Honora Kortio; dekstre, la ĉambro de l' nuna gardisto. Oni komencas

la viziton de maldekstre kaj tiel prezentigas:

I. SALONO DE LA ĈEVALOJ. — Tie *Pagni* kaj Mantovano pentris na-

turbilde ses el la plej belrasajn ĉevalojn de Frederiko Gonzaga; oni admiras belegan plafonon lignoskulptitan kun rozegsimila skulptaĵaro de *Gaspardo Amigoni*.

II. SALONO DE PSIĤO. — Pri ĉiuj pentraĵoj ornamantaj ĉi tiun salondon kaj ilustrantaj la Psiĥlegendon J. B.



Te'-Palaco: Salono de Fetonto aŭ de la Agloj

Intra donis la plej ekzaktan kaj kompletan priskribon. La tuta amlegendo de la mitulino Psiĥo disvolviĝas tie per pli ol dudeko da mirindaj pentraĵoj, kies freŝeco vidigas la majstrecon de Julio Romano kaj de liaj disĉiploj.


III. SALONO DE LA MEDALIONOJ. — Dekses medalionoj ĉirkaŭe pentritaj montras la agadojn ordinare faratajn en la duopo de la kvar sezonoj

kaj la historiojn de la dekdu monaĵoj; bonkonservitaj gipsaĵoj kompletigas la salonornamon.

IV. SALONO DE FETONTO AŬ DE AGLOJ. — Ĉe la salonanguloj estas ore pentritaj kvar imponaj agloj; Julio Romano majstre pentris diversajn mitologiaĵojn. En la rondo meze de l' ar-

kaĵo oni vidas stukaĵojn de *Primaticcio* kaj de *Niccolò* el Milano; tri belegajn marmorajn bustojn de Romaj Imperiestredzinoj; la pordofostoj estas el multvaloraj marmoroj.

V. GRANDA PORTIKO. — Gajecaj pentrornaĵoj laŭ *Raffaello* kaj groteskaĵoj ornamas la Grandan Portikon. En la arkaĵo *Pagni* pentris ses graciajn infanojn kaj, en la meza okan-



Te'-Palaco: Salono de la Stukaĵoj

gulo, *Urion* ebriigintan; sub la arkaĵo estas pentrita la David-historio; malaltreliefoj kaj stukaĵoj medalsimilaj de *Primaticcio*; laŭlonge la muroj, simil-

bronzaj stukaĵoj daŭrigantaj la David-historion kaj dekvar gipsaj statuoj en niĉoj. Ĉi tie estis ricevita Karlo V en jaro 1530.

VI. SALONO DE LA STUKAĴOJ. — Poste oni eniras la salonon de la stukajoj, tiel nomitan, ĉar en tiu salono estas nur stukajoj kaj nenia pentraĵo. lero, ĉiuj ordigitaj kiel marsantaj en batalon. *Primiticcio* kaj *Scultori*, kiuj ellaboris ĉiujn stukajojn, volis prezenti per tio la triumfan eniron en Manto-



Te'-Palaco: Salono de Julio Cezaro


Duobla zono da malaltreliefoj ĉirkaŭas la parietojn kaj montras kompletan militistaron Romanan, laŭ la Trajana Kolono en Romo. En la supra zono estas la fanterio kaj en la suba la kava-

von de Imperiestro Sigismundo, en 1433, por doni titolon de Markizo al la Kapitano de l' Popolo Johano Francisko Gonzaga. Du belaj stukstatuoj figuras Herkuleson kaj Marson kaj la tuta plafono

estas ornamita per stukajoj figurantaj mitologiajn.

VII. SALONO DE JULO CEZARO. — *Primiticcio* ĉi tie pentris sub la arkaĵo grandan medalionon montrantan la gloran Romanon kun siaj liktoroj ordonantan, ke oni forbruligu la malamikan dokumentaron trovitan ĉe Pom-

vano, Luko el *Faenza*, Fermo el *Caravaggio*, pentris la batalon de l' ribelaj grandeguloj alirantaj ĉielen por eltronigi Zeŭson; sur la parietoj, de la arkaĵo ĝis la pavimo, oni admiras la kolosajn timigajn figurojn de la grandeguloj mortantaj aŭ fulmefrapitaj, aŭ sub temploruinaĵoj, aŭ sub la



Te'-Palaco: Salono de la Gigantoj - La Gigantoj fulmefrapitaj de Zeŭso

peo. Supre la pordoj du medalionoj montras Scipion, kiu redonas la edzinon al la malamiko, kaj Aleksandron kiu malkovras la Homerpoemojn. Ĉirkaŭ la arkaĵo, romantikvaj militistfiguroj.

VIII. SALONO DE LA GIGANTOJ. — En tiu salono la arkaĵo, rondforma ĉe la anguloj, formas tutaĵon kun la parietoj. En 1532 Julio Romano desegnis kaj liaj discipoloj Rinaldo Manto-

stonegoj, kiujn ili mem ĵetis ĉielen, refalantajn teren. Pro la stranga strukturo de tiu salono de angulo al alia oni aŭdas plisilaban eĥon, kiu saĝnas akompani per voĉbruo la impresajn faktojn tie pentritajn.

IX. — Antaŭe troviĝas kelkaj alia salonetoj, kvankam nemultgravaj, tamen gracie ornamitaj.

X. LA GROTDOMETO. — Reveninte en la Grandan Portikon oni trans-

paŝas ponton kaj trairas vastan korton kie, ĉe l' fundo, estas malgranda konstruaĵo nomita « La Groto ». Tie estas, en la vestiblo: ĉarmaj pentronamaĵoj laŭ stilo de Rafaelo. En la saloneto, nomata de *Attilio Regolo*: pentraĵoj de disciploj de Julo Romano laŭ desegnoj de la majstro; en la ĉarma loĝieto: dekunu pentraĵoj de Romano kaj de *Primaticcio* prezentantaj la okazaĵojn de l' homa vivo, aliaj pentraĵoj kaj belaj Rafael-ornamaĵoj; en

LA BAZILIKO DE S. ANDREO

Estas unu el la plej grandaj kaj plej belaj preĝejoj de Italujo. Ĝian konstruon oni komencis en jaro 1472, laŭ desegno de l' tre fama arkitekto Leonardo Baptisto Alberti, sub direktado de lia skolano Luko *Fancelli* kaj, poste, pro la multfoje interrompitaj laboroj, de Antonio Marjo Viani kaj de Jozefo Torre. Ĝi estis finkonstruita en 1782, post tri jarcentoj, kiam Filipo Juvara starigis la majestan kupolon similan al tiu de S. Petro en Romo, kaj Paŭlo *Pozzo* kompletigis la ornamajlaborojn. La sonorilturo, en klasika gotiklombarda stilo, estas tiu de la antaŭekzistinta preĝejo kaj estis konstruita en la jaro 1413.

La originala fasado de la Baziliko, riĉe ornamita per terakoto, konsistas el triumfa arkaĵo kun supera triangulo, en kies mezo medaliono, freskita de Andreo *Mantegna*, montras la sanktulojn Andreon kaj Longinon, kaj el alia plimalgranda arkaĵo super la triangulo.

La vestiblo estas ornamita per delikataj stukajoj en la plafono; la klasikstila ĉefpordo havas marmorajn fos-

la korteto: stukajoj; kaj fine la Groto, iam belege ornamita per konkoj, statuoj, akvosprucoj, sed nun tute difektita.

Tiel finiĝas ĉi tiu rapida priskribo de tiu artmonumento, al kiu kunigis multaj historiaj memoroj, pri kiuj informas la Mantovaj kronikoj; festenoj, diboĉoj, spektakloj okazis en tiu plezuregejo, kiu resumas la vivon brilegan travivitan dum jarcentoj de la Princoj Gonzaga.

tojn, kies eleganta dekoracio, skulptita tiel delikate kaj gracie kiel punto, estas verko de fratoj Antono kaj Paŭlo Mola, Mantovanoj, de la XV jarcento.

La interno, grandioza, nur ununava, havas formon de latina kruco. La tuta longo mezuras 103 metrojn, la larĝo 20 kaj la alto 28 metrojn; la alteco, de la pavimo ĝis la kupolo, 80 metrojn. Ĉiuflanke de la navo estas, alterne, tri malgrandaj kaj tri grandaj kapeloj; la du brakoj de la transepta navo havas po du grandaj kapeloj. La preĝejo estas tute pentrita; en la arkajoj, pilastroj, volboj, en la grandaj kaj malgrandaj kvadratoj, ĉiuflanke, ĉie estas pentraĵoj. La duobla pentra vico inter la navpilastroj montras okazintaĵojn de l' nova kaj de l' malnova Testamento.

Oni komencu la viziton dekstraflanke. En la unua granda kapelo, la pentraĵo de Julo Cezaro Arrivabene (1846) montras « S. Antonon kiu riproĉas *Ezzelino*'n el Romano ». Sur la muroj *B. Pagni* freskis en 1570 « Inferon », « Purgatorion » kaj « Paradizon » laŭ Dante'a legendo. En la dua kapeleto

oni vidas pentraĵon de nekonata aŭtoro de la XV jarcento; la pentraĵo figuras la « Virgulinon sur trono, al kiu abato *Gerolamo Redini* prezentas desegnon de la preĝejo alnomita de la Venko ». Sur la murflankoj du fres-

Virgulino », la « Asumpcion » k. a. estas aljuĝataj al *Andreasino*. En le tria granda kapelo estas kopio de « Kristnaskigo », verko de R. Mantovano; la originalon de Julo Romano, kiu tie estis antaŭe, la Gonzagaj dukoj forprenis



Baziliko de S. Andreo

koj de R. Mantovano prezentas la « Martirigadon de S. Sebastiano ». En la dua granda kapelo: la « Altaro el ligno », la « Statuo de l' sidanta Virgulino »; tiuj de « Beata Kataneo » kaj « S. Sempliciano » estas verkoj de l' XVI jarcento; la pentraĵoj figurantaj la « Naskigon de l'

kaj poste vendis al Karolo I el Anglujo kaj oni ĝin nuntempe admiras en *Louvre*-palaco en Parizo. La flankajn parietojn pentris Rinaldo Mantovano en 1535; la unua pentraĵo prezentas la « Retrovon de Kristosango », la alia la « Krucumon ».

En la unua kapelo de la dekstra transepto oni vidas la « *Cantelmi*-maŭzoleon », jonik- kaj dorikstilan; tombmonumentoj, memorŝtonoj, k. c. estas ĉi tie multnombre kolektitaj memore de la plej bonfamaj Mantovanoj. En la mezo de la kapelo oni vidas tolpentraĵon de F. Borgani titolitan « Retrovo de Kristoŝango ».

Ĉe la transepta ekstremaĵo staras majestega « Maŭzoleo » kun sfinksoj, statuoj, bronza cigno, marmobusto, k. c. dediĉita al Episkopo G. *Andreasi*, laboraĵo de P. *Clementi* (1549). En la dua kapelo, ĉiam de la dekstra transepto, estas altaro ornamita per marmorkolonoj kun bronzorumitaj kapiteloj, blazonŝildoj, sidantaj statuoj, anĝeloj, k. c.; la belegan bronzan « Krucifikson » faris J. *Bellavite*.

En la kupolo. La « Gloro de l' Paradizo »; en la subaj grandaj arkaĵoj: la « Kvar Evangeliaĵoj »; en la duonkupolo super la ĉefaltaro: la « Martirigo de S. Andreo » kaj alegorioj. Ĉiuj ĉi tiuj verkoj estas de Georgo Anselmi, pentritaj komence de 1775. La ĉefaltaron starigis Paŭlo *Pozzo* dum 1803, kaj la orumitajn bronzaĵojn, kiuj ĝin ornamas, faris Johano *Bellavite*. Sub la sunplena kupolo staras okangula « Genufleksejo » el delikata marmoro, riĉa je altreliefaj skulptaĵoj.

En la alia branĉo de la transepto, dekstre, flanke de la ĉefaltaro, la « Kapelo de S. Karlo »; la pentraĵo prezentas la « Dipatrinon kun sanktuloj », verko de J. *Caccioli*. En la kontraŭa kapelo staras « *Strozzi*-maŭzoleo », starigita en 1529, konsistanta el kvar kariatidoj, kiuj subtenas sarkofagon el nigra ŝtono kun surkuŝanta virinstatuo. Meze staras tombmonumento dediĉita al Margareto Malatesta; funde, maŭ-

zoleo al geedzoj *Andreasi-Gonzaga*; oni ankaŭ admiras buston de Paŭlo *Pozzo*, maldekstre la monumenton kun laŭnaturgranda marmorbusto de Tuljo *Petrozzani*. Meze de la kapelo estas tolpentraĵo « Kristo krucumita »; dekstre, « Ŝtonmortigo de S. Stefano », ambaŭ de Viani; maldekstre, « Predikado de S. Stefano » de Roma pentristo Domenico Feti.


Revenante al la enirpordo en la unua granda kapelo de la navo: belega « Krucifikso », pentraĵo de Fermo *Ghisoni*, skolano de Julio Romano. En la dua granda kapelo: la « Virgulino » kaj la « Anĝelo », tolpentraĵoj ornamantaj la altarflankojn, ambaŭ verkoj de *Andreasino*. Fine de la XVI jarcento *Lorenzo Costa* « la juna » sur la parietoj freskis la « Viziton de l' pastistoj » kaj la « Adoradon de l' Tri Reĝoj »; ĉi tiuj freskoj nun estas tre difektigitaj. Oni rimarku ĉi tie kaj en la sekvanta granda kapelo la belegajn rafaelaĵojn, kiuj bele ornamas la parietojn.

En la tria granda kapelo: la pentraĵo « La Virgulino sidanta sur tronokaj sanktuloj » verko de L. *Costa* « la plej maljuna »; la freskoj « Kristreviviĝo » kaj « Malsupreniro al Limbo », ambaŭ laboraĵoj de F. *Perla*; bedaŭrinde ankaŭ ĉi tiuj estas multe difektigitaj. Oni laste admiras la apudan kapeleton dediĉitan al Andreo *Mantegna*; oni vidas maldekstre artriĉan medalionon kun busto el bronzo de l' fama pentristo, enfermita en porfira disko, artaĵo de Andreo *Cavalli*; la pentraĵo figuranta la « Sanktan Familion » estas verko de Andreo mem: la « Kristobapto » kaj « Entombigo » estas alskribitaj al lia filo Francisko.

Restas ankoraŭ vizitinda la « Kripto », al kiu oni malsupreniras per kvar grandaj ŝtuparoj, kies pordoj estas en

la transepto. La Kripto, dorikstila, havas grekokrucan formon; la navojn kaj arkaĵojn subtenas tridekvar kolonoj. La ĉefaltaro estas ornamita per orumitaj bronzaĵoj; aliaj altaretoj okupas la absidojn je l' fundo de l' navoj. La « Krucifikso-altaro » el alabastro

kun blazonŝildoj de *Gonzaga-Medici*, la belega « Krucifikso », estas ambaŭ de la XVI jarcento; la meza templo estas laboraĵo de J. B. *Marconi* (1818). Oni ĉiuloke vidas monumentojn, funebrajn surskribaĵojn kaj famajn blazonŝildojn.



Baziliko de S. Andreo: Interno

LA KATEDRALO

La « *Duomo* » staras sur loko, kie dum Konstantina periodo estis la preĝejo de Apostoloj Petro kaj Paŭlo. El tiu preĝejo, arkepinta, oni vidas ankoraŭ restaĵon dekstraflanke de la Katedralo. La tie staranta masiva turo, mezalta, kvarangula, en sia malsupra parto apartenas al Roma epoko, kaj la supra parto estas XII-jarcenta.

Inter jaroj 1393 kaj 1401 estis konstruata la nuna Katedralo tia, kian oni ni vidas en la pentraĵo de Domenico Mo-

rone, kiu estas de kelkaj jaroj en la Duka Palaco. Detruita pro brulado en 1545, ĝi estis ree konstruita ordone de Ĉefepiskopo Herkuleso Gonzaga, laŭ desegno de Julio Romano, sed pro lia morto la desegno estis aliformigata de arkitektoj Bertani kaj *Covo*.

La marmora fasado, kiu starigis Nikoloo *Baschiera* en 1756, estas barokstila kaj ĝi tute kontrastas, laŭ juĝo de l' kompetentuloj, kun la stilo de la templo; simpla, severa, ĝi estas riĉa

je medalionoj kaj statuoj surstarantaj, kiuj prezentas diversajn sanktulojn protektantojn de la urbo.

La interno konsistas el kvin navoj sin apogantaj sur kolonegoj korintstilaj. La meza navo leviĝas pli ol la aliaj en duobla vico; ĉe l' arkitravo de l' unua vico etendiĝas elegantaj festonornamaĵoj el orumita stuko interligantaj rektangulaĵojn kun medalionoj, kie oni vidas tre graciajn blankstukajn amoretojn sur ora fono. La supera vico dividiĝas je fenestroj kaj niĉoj enhavantaj altreliefajn statuojn de Profetoj kaj Divenistinoj (Sibiloj). Perfekte laborita estas la plafono, kies trabaĵo interkruciĝa formas proporciajn kvadrataĵojn kun, ĉe funde, rozformaj lignoskulptaĵoj orumitaj.

La apudflankaj navoj kun mikslinia ornamaĵo estas barelarkaĵe superfermitaj, kaj la ekstremaj estas superfermitaj per plata plafono samstila al tiu de la ĉefnavo sed blankaĵe ellaboritaj.

La kapeltrairejoj estas arkformaj; delikataj basreliefoj ornamas la arkaĵojn kaj inter unu kapelo kaj alia troviĝas niĉoj enhavantaj plastikan statuon de sanktul- aŭ sanktulino, pri kies nomo ni parolos poste.

Ĉiujn rimarkindaĵojn, kiuj apartenas al tiu ĉi sanktejo, ni modeste priskribos dum nia rapida vizito.

Ĉe la dua altareto, dekstre, tolpen-traĵo « S. Eliĝo », verko de J. B. Pos-senti. Ĉe la dua altareto la tolpen-traĵo prezentas la « Krucifikson kun sanktuloj » de nekonata aŭtoro; estas notinda la marmora paliumo flankumita de arte skulptitaj fostoj; arkaĵo XVI-jarcenta. Inter la unua kaj la dua altareto oni admiras la dikan kristanan sarkofagon blankmarmoran kun reliefe skulptitaj historiaĵoj; ĝi estas la plej rimarkinda monumento de la krista-

na antikveco, kiun posedas la urbo: laboraĵo supozeble de la V aŭ VI jarco.

La tolpen-traĵo de la tria altareto prezentas « S. Klaron kaj Sanktulojn, kiuj preĝas la Virgulinon kun Infano », de pentristo Rutta. La statuoj en niĉoj estas sanktuloj: Francisko el *Sales*, Karlo Borromeo kaj Francisko el *Assisi*.

La « Baptejo » estas bela templo konstruita en la malsupra parto de l' turo. Ĝi enhavas antikvegan sanktavujon arabeske ellaboritan. Funde de la kapeltrairejo estas monumento kun laŭ homa granda busto al Episkopo Aleksandro *Andreasi*, kaj dekstre de la navo, oni vidas enmurigitan plastikmedalionon al pentristo Benedikto *Castiglioni*, ĉi tie mortinta en 1665.

Pentraĵoj tre ŝatindaj de *Andreasino* kaj *Ghisi* ornamas la transversan navon kaj la kupolon; sanktulbildoj kaj okazintaĵoj eltiritaj el Sanktaj Skribaĵoj beligas la arkaĵon de la dekstra navo-branĉo. Sur la parietoj oni vidas la « Adoradon de l' tre precioza Jezusango » flanke de geedzoj Vinĉenzo kaj Eleonoro Gonzaga, de S. Anselmo kaj Matildo; supre de la maldekstra altareto la fresko prezentas la Ĝeneralan Religian Konsiliĝon, kiun Pio II okazigis en Mantovo, dum 1459, por konvinki la kristanan nobelaron por nova krucmilitiro kontraŭ la Turkoj.

En la dekstra altareto, tolpen-traĵo « Madono el Itri » de nekonata aŭtoro; en la maldekstra altareto la « Gardanĝelo » de *Canuti*; de l' sama pentristo, ĉe la altarsupro, oni vidas atentindan pentraĵeton « S. Tomazo el *Aquino* ».

Interne de la kupolo estas freskita la « Gloro en Paradizo », en subarkoj multnombra vico da Anĝeloj kaj la kvar Evangeliaĵoj en anguloj, faraĵoj, kiel dirite, de *Andreasino* kaj *Ghisi*. Sub

la ĥorejarkaĵo Domeniko Feti freskis « S. Johanon Baptiston » kaj « S. Triunuon kun Virgulino ».

Flanke de l' ĉefaltaro estas videblaj du bonegaj tolpen-traĵoj: la unua prezentas la « Preĝadon de Kristo en la olivĝardeno », la alia la « Vizion de S. Johano Evangeliaĵo », de *Gerolamo Mazzola* alnomita Bedolo. Ĉirkaŭe de la ĥorejo troviĝas aliaj kvin bonaj pen-traĵoj, nome « S. Karlo », de *Carloni*; « Naskiĝo de Mario Virgino », de *Sabes*; « Senmakulino », de *Balestra*; « Transiro de S. Jozefo », de *Cignaroli*; kaj « Entombigo », de *Turchi*.

Sciindaĵo: sub la tablo de l' ĉefaltaro en vitra urno kuŝas korprestaĵo de S. Anselmo, mortinta en 1802, protektanto de Mantova Eparkio.

Kiel en la dekstra tiel en la maldekstra arkaĵo de l' navo transversa la freskoj temas pri faktoj eltiritaj el S. Skribaĵoj, kaj sanktulaj bildoj. Sur la parietoj oni vidas la « Adoradon de l' *Preziosissimo* » flanke de Karlo la Granda, de Leono III, de Aleksandro II kaj de *Beatrice Canossa*.

Supre de la dekstra altareto oni admiras freskon de *Andreasino* kaj *Ghisi* prezentantan la Religian Konsiliĝon kiun Aleksandro II okazigis en Mantovo dum 1067 pri la kontraŭpapo Kadalo. En la dekstra altareto, « Transiron de S. Jozefo », de *Sebastiano Conca*; en la maldekstra, « Madono kun Sanktuloj », de *Malpizzi*. Sekvas la Preĝejeto de l' Sakramento, kiu estas konstruaĵo okangula arke arkitekturita kun kolonoj korintstilaj. La « Fido » freskita meze de la arkaĵo kaj la tolpen-traĵoj prezentantaj la « Kvar Ekleziajn Doktorojn » estas de *Felice Campi*; notindaj: « S. Margareto », de *Bru-sasorci*, maldekstre; « S. Martino el *Tours* », de P. Farinata, dekstre, kaj

la altara pen-traĵo, kiu prezentas la « Alvokon al apostoleco de Petro kaj Andreo », kopiaĵo de F. *Campi*.

De la sama aŭtoro, en apuda kapeleto, estas belega « S. Jeronimo »; dekstre de tiu kapeleto oni vidas enmurigitan medalionon pri la meritinda prelato Luizo Martini: ĝi estas bela artaĵo de P. *Della Vedova*. Sekvas mezgranda halo kun multnombre da funebraj surskribaĵoj, kondukanta al templo de la « *Incoronata* » kaj al Sakristio. La volbo de la templo estas freske dekoraciita per ok medalionoj kies pen-traĵoj, laŭimite de *Mantegna*-skolo, temas pri travivaĵoj de Mario Virgino. Ĉemure estas kelkaj pen-traĵoj je kelka valoro, kiel « S. Teklo », de *G. Mazzola* (Bedolo); « S. Magdaleno », de *Baptisto Dal Moro*, k. a. Troviĝas ĉi tie ankaŭ la tombo de Episkopo *Bonacolsi*, kaj du sarkofagoj entenantaj la korprestaĵon de Princo Ferrante Gonzaga kaj tiun de Kardinalo Herkuleso Gonzaga.

Laŭ arta kaj historia vidpunkto estas multvalora la jam nomita templo de la *Incoronata*. En ĝi oni admiras belajn freskojn de *Ghisi* kaj *Andreasino*. Sub flankaj arkaĵoj de la kupolo: « Transiro de l' Virgulino » kaj « Malsupreniro de la S. Spirito » kaj sub arkaĵo de la altaro « Ĉieliro de Mario ».

Oni revenu en la katedralon, por viziti la restantajn altaretojn, kiuj enhavas ŝatindajn laborojn, nome: « S. Felicito » ĉe la unua altareto, de nekonatulo; « S. Lucio » de *Ghisi*, ĉe la dua; « S. Specioso », de *G. Mazzola*, ĉe la tria; fine la « Martirigado de S. Agato », ĉe la lasta altareto.

Inter la altaretoj staras tri belaj plastikstatuoj, kiuj prezentas S. Apolonion, S. Andreon Apostolon, kaj S. Katarinon, ĉiuj artaĵoj de *Primiticcio* kaj *Scultori*.

CATTEDRA ITALIANA DI ESPERANTO

(Istituto Linguistico Nazionale fondato nel 1912)

DIREZIONE: VIA DE' NERI 8, FIRENZE 118

ATTI UFFICIALI

— Il 20 Settembre si riuni in seduta pubblica il Collegio Direttivo che approvò ad unanimità la relazione morale e finanziaria presentata dal Direttore. Il Collegio Direttivo prese atto con soddisfazione del funzionamento dei vari Istituti i quali hanno, in massima, avuto modo di esplicare opera attiva e di provata efficacia. Esaminò vari argomenti d'indole interna e respinse la proposta di modificazione dell'art. 13 dello Statuto. Su proposta Migliorini-Orengo confermò con un voto di plauso l'attuale Direttore.

— I Direttori degli Istituti Regionali sono invitati, secondo la decisione collegiale del 20 Settembre, a far pervenire alla Direzione della Cattedra entro il 20 Ottobre eventuali proposte di nomina di Membri effettivi, a norma dell'art. 8 dello Statuto.

— Alle domande che non abbiano particolare carattere di urgenza e che non sieno accompagnate da francobollo la Direzione risponderà unicamente per mezzo dell'*Itala Esperanta Revuo*, organo ufficiale della Cattedra, al quale tutti i Kate-dranoj hanno obbligo di essere abbonati.

— Alla sessione di Esami tenuta durante il Congresso hanno ottenuto il certificato di 2° grado inferiore i candidati Dozzo Sig.na Ada, Corti Sig.na Lina, Liverani Prof. Augusto, Rossetti Conti Sig. Alberto, Rossetti Conti Sig. Egisto e Starnini Sig.na Vittoria; il diploma di 1° grado superiore i Sigg. Blasimme Rag. Ascenzio di Roma, e Ingle G. Wilfred di Varese; il diploma di 2° grado superiore il Signor Facchi Prof. Gaetano di Brescia.

— Sono pervenute le seguenti offerte: Gruppo Esp. di Roma L. 30; Muretti Ing. Mario L. 25; Migliorini Prof. Bruno L. 10.

ITALA KRONIKO

Udine. Dum Aŭgusto du aliaj publikaj paroladoj okazis, laŭ iniciato de loka Grupo. La 11-an S-ro Aristide Caneva paroladis pri la brila temo: « De partero al scenejo » kaj, kune kun sia filo S-ro Ermes, specimene ludis iaju, ege aplaŭditajn, monogolojn. La 18-an, Prof-ro Giov. Del Puppo, direktoro de la urbaj Muzeo kaj Art-galerio, per sia amuz-instrua parolado pri « Etaj artaĵoj » fermis la unuan serion de niaj someraj paroladoj, kiuj denove, dum Septembro, estos aranĝataj.

— Dum Estrar-kunveno de la 9-a Septembro oni rememoris nian ageman Grup-konsilanton Mario Cavagna (forrabita de la morto la 1 Sept.) transdoninte al lia familio Grupa membro-karto « ad memoriam ».

La funebran ceremonion partoprenis arego da Samideanoj kune kun la flago kaj, per kortuŝantaj vortoj, adiaŭis nian kunfraton la Gruppezidanto Sam. Franco Bodini.

Voghera. Dimanĉon la 15-an de Aŭgusto per speciala granda automobile la Voghera esperantistaro multenombre ekskursis al mon-

to « Penice » sur kiu flirtis nia verda flagoto dum la tuta tago.

Estis tre ĝojiga, agrabla kaj neforgesebla ekskurso.

NEKROLOGIO

La Udine'a Esperanto-Grupo kortuŝite anokas la subitan elviviĝon, okazinta la 1-an Septembro, en aĝo de 38 jaroj, de sia agema kaj fervora kunbatalinto

MARIO CAVAGNA

Popollerneja instruisto — membro de UEA kaj FEI — Grupkonsilinto kaj kursgvidinto.

Al la memoro de tiu kara kaj neforgesebla Amiko ni volas esprimi la sinceran dankon de nia Grupo pro la ĉiam milda kaj valorplena kunlaborado.

Al lia nekonsolebla familio ni respektplene prezentas la emociplenan esprimon de nia kondolencoj.

— Sam. Galliano Dolce, konsilanto de Esperanto-Grupo en Udine, havis la malfeliĉan perdi sian Patron, dum Aŭgusto. Sinceraj kondolencojn.

IER partoprenas kortuŝe la kondolencoprimojn.